Heinrich Heine,

La tri reĝoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

El la "Libro de la kantoj", La reveno, XXXVII

La sanktaj Tri Reĝoj el la orient',
Demandis en ĉiuj urbetoj:
"Kie estas la voj' al Betlehem',
Vi karaj geknabetoj?"

Sed ĉiuj homoj ne sciis ĝin,
La reĝoj do pluiris;
Gvidis ilin lumanta stel',
Kaj tiu ilin altiris.

Ĝi montris la domon de Jozef',
Ili estis enirintaj;
La bovo bruis, kriis la infan',
La reĝoj estas kantintaj.

Traduko de la Germana poemo "Die drei Könige" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-878-1759 (2013-04-11 14:38:41)